

INFORMACIJE

INFORMOJ

Leto / jaro 26, št. / n-ro 3

september / septembro 2021

Uvodnik

Frontartikolo

La espero, ke ni finfine venkis la epidemion de la koronavirusa malsano, denove mortis. Ni antaŭvidas novan periodon de forte limigitaj fizikaj interrilatoj. Do ni des pli restarigos virtualan ĉeestadon. Bedaŭrinde iuj gekolegoj estas en tiu agado inhibataj pro neuzo de la telekomunikaj teknikiloj.

Tiun ĉi someron ni realigis renkontiĝon sur la monto Lisca kaj almenaŭ gustumis kunestadon ĉe kuna tablo, promenadon en la naturo kaj lernadon per fizika ĉeesto de la instruisto. La kunvenoj, planitaj por la aŭtuno kaj la vintro, eble devos ŝanĝiĝi en video-konferencojn, kiu scias? Sed ni ne rezignos pri niaj planoj kaj agadoj, ni trovos novajn vojojn kaj novajn apogantojn kaj helpantojn.

Upanje, da smo konĉe premagali epidemio koron-ske virusne bolezni, je spet umrlo. Pred nami je ponovo obdobje moĉno omejenih fiziĉnih stikov. Torej bomo ŝe bolj okrepili virtualno sodelovanje. Ŝal pa so nekateri pri tem izloĉeni, ker ne uzorabljaio telekomunikacijske tehniko.

Poleti smo izvedli sreĉanje na Lisci in vsaj okusili druŝenje za skupno mizo, pohod v naravi in uĉenje v neposrednem stiku z uĉiteljem. Jesenski in zimski dogodki, ki so naĉrtovani, se bodo morda morali spremeniti v video-konferenco, kdo ve? Vendar pa svojih naĉrtov in dejavnosti ne bomo opustili, poiskali bomo nove poti in nove podpornike in sodelavce. **O.K.**

Iz dejavnosti ZES

El la agado de SIEL



ZDRUŽENJE ZA ESPERANTO SLOVENIJE • SLOVENIA ESPERANTO-LIGO

Kursoj kaj rondoj en Slovenujo

Laŭ aktuala sansituacio en Slovenujo oni ĉeeste aŭ virtuale povas kunveni por kursoj, rondoj, kunsidoj aŭ aliaj aferoj en sekvantaj ejoj aŭ videokonferencoj:

La paroliga rondo en la Intergeneracia centro Kranj (Strato Ulica talcev 7) ĉiun 2-an kaj 4-an mardon en la monato je la 18:45, gvidas Gregor Markiĉ.

Nova reta kurso de Esperanto »Maribor« por komencantoj komenciĝos en decembro: merkrede je la 18:00, gvidos Peter Grbec.

Kurso Izola: en la Intergeneracia centro Izola ĉiun ĵaŭdon je la 14-a horo, gvidas Peter Grbec.

Kurso Slovenj Gradec: en la Intergeneracia centro Andeŝki hram ĉiun mardon je la 13-a horo, gvidas Davorin Juraĉ. La reta kurso por progresantoj kun Davorin komenciĝos en oktobro: marde je la 19:30.

Paroligaj vesperoj en Ljubljana: en la klubejo de SIEL (Stefanova-strato 11) ĉiun 1-an kaj 3-an mardon en la monato je la 18-a horo. **O.K.**

Esperanto-Tago 2021 sur la monto Lisca



Anstataŭ en la klubejo en Ljubljana, Slovenia Esperanto-Ligo (SIEL) ĉijare organizis la renkontiĝon okaze de la Esperanto-Tago 2021 en freŝa monta medio sabaton, la 24-an de julio 2021, je la 10-a horo ĉe la renovita montkabano »Tonĉkov dom« sur Lisca (948 m super la maro). Ĝis preskaŭ la montsupro de

Lisca kondukas pluraj irvojoj kaj asfalta ŝoseo, ĉirkaŭ 12 km de la urbeto Sevnica.



La programo ĉe la montkabano (Foto A. Ŝ. S.)

Kvankam kelkaj de ni jam vendrede enloĝiĝis en la montkabano, pli ĝuste monthotelo, je la anoncita horo amasiĝis dudek du geanoj kaj gekursanoj. Sufiĉe bona rezulto pro la feria tempo!

La programo estis neformala, sed riĉa kaj bunta: novaĵoj el Esperantujo, la novverkita rakonto de Vinko Zalezina *Romanco sur Lisca* (vidu en la rubriko *El la movada historio*), raporto de Peter Grbec pri la sukcesa virtuala kurso de Esperanto por komencantoj, la tradukado de la esperantigitaj eŭskaj proverboj en la slovenan (elektis kaj gvidis Janez Jug), trinketoj kaj post la tagmanĝo dek-tri partoprenantoj faris nelongan, sed pro la varmego streĉan, ekskurson al la najbara monto Ješovec (934 m super la maro) kun lokaj gvidantoj (Anka Vozlič, Simon Urh, Vinko Zalezina). Ĉe aparta tablo, kvar gekursanoj unuafoje ĉeeste kunsidis kun Peter Grbec por plenumigi lecionon de Esperanto. Posttagmeze oni povis spekti tre interesan aranĝon *Tradicia falĉado kaj rastado sur Lisca*. Tie oni povis ankaŭ gustumi hejmfaritajn panojn, lardkukojn kaj dolĉaĵojn.



Post la grimpadado sur Ješovec (Foto A. Ž. S.)

Dimanĉon ok partoprenantoj de la renkontiĝo ekveturis de Lisca por la rondvojaĝo tra historiaj aŭ eĉ paleolitikaj restaĵoj, nomataj *La vojo de Oriono*. Ni komencis en la iama kartuzia monaĥejo Jurkloŝter kaj eksciis la rakonton pri Frederiko la Dua, grafo de Celje, kaj lia edzino Veronika (vidu la rakonton de Vinko Zalezina en la rubriko *Beletra angulo*). Post la vizito de la muelejo ĉe la rivereto Graĉnica, kie kaŝis sin la filo de Frederiko kaj Veronika, ni kontinuus per paleolitikaj restaĵoj de nekonata kulturo. Gvidis nin Vinko Zalezina, kiu kiel lokano kaj kompetentulo plej bone scias interpreti kuriozajn kaj strangajn artefaktojn aŭ fenomenojn. Ni finis la ekskurson ĉe la megalito *La renversita piramido* konsciante, ke *La vojo de Oriono* kaŝas ankoraŭ multajn vidindaĵojn kaj ke oni devas reveni por plua esplorvizito.



Vinko Zalezina interpretis la fenomenon de la renversita piramido (Foto O. K.)

La estraro de SIEL decidis celebri la Esperanto-Tagon ankaŭ per senpaga disdono de du libroj el sia stoko al la membraro. Temas pri 3 *satiroj* kaj *Internacia lingvo – ĉu reala aŭ nereala utopio?* (Mednarodni jezik: realna ali nereala utopija?). Esperanto-Societo Maribor tiuokaze starigis novan retpaĝon *Publikacije / Publikajoj*, kie oni povas senpage elŝuti e-librojn. Komence, du eldonaĵoj de ESM estas al dispono. **O.K.**

Ĉu vi jam esprimis vin en la civitana dialogo pri la estonteco de Eŭropo?

UEA-Komisiono por eŭropa agado kune kun EEU daŭre varbas por instigi esperantistojn partopreni la civitanan konsulton de la nuna eŭropunia "**Konferenco pri la estonteco de Eŭropo**". Detale informas pri la UEA/EEU-kampanjo la UEA-vikipaĝo https://uea.org/vikio/Konferenco_pri_la_estonteco_d_e_Eŭropo (mallongigita retadreso de tiu vikipaĝo: <https://mallonge.net/uea-eeu>). Universala Esperanto-Asocio kaj Eŭropa Esperanto-Unio kampanjas por **antaŭenigi nian lingvon en EU** kadre de la eŭropunia Konferenco pri la estonteco de Eŭropo.

La kampanjo enhavas **du fazojn**:

- **Unua** fazo, ĝis ĉirkaŭ oktobro 2021: UEA, EEU rekte kaj pere de landaj kaj fakaj asocioj instigas esperantistojn laŭeble multnombre apogi por-esperantajn proponojn. En oktobro 2021 eklaboros la civitanaj diskutejoj, kiuj pridiskutas la civitanajn proponojn.
- **Dua** fazo: UEA, EEU kaj landaj/fakaj asocioj kontaktos deputitojn en la Eŭropa Parlamento kaj membroŝtataj parlamentoj, kaj reprezentantojn de la Eŭropa Komisiono, ministrejojn de EU-membroŝtatoj kaj

ĵurnalistojn. Ili argumentos pri nia lingvo je la nivelo de EU aŭ ties membroŝtatoj. En tiu fazo niaj organizoj kalkulas je apogo de por-esperantaj proponoj far individuaj esperantistoj: ju pli da apogo por niaj proponoj, des pli konvinka kaj efika la argumentado.

La estraro de SIEL invitas ĉiujn geanojn kaj geapogantojn de nia movado konatiĝi ankaŭ kun la enhavo de la proponoj, por kiuj nia organizo kune kun UEA/EEU varbas. Neoficiala traduko en la slovenan troviĝas en la rubriko *Informoj kaj invitoj* de tiu ĉi numero de la bulteno. **O.K.**

Nov klubski prostor ZES in EDL

Laŭ plano SIEL transloĝiĝos de Stefanova 9 ĝis la fino de la jaro 2021. La nova ejo en la strato Grabloviĉeva Nro. 28 ebligas SIEL kaj ES Ljubljana plenumi multajn funkciojn, precipe instruadon de Esperanto, libroservon, fakan bibliotekon kaj ordigon de la movada arkivo.

Mestna občina Ljubljana je prisludnula naŝi proŝnji za veĉji prostor za opravljante naŝe dejavnosti. Dodelili so nam veliko pritliĉno sobo na Grabloviĉevi 28, ki jo bosta skupaj uporabljala ZES in EDL. Soba se nahaja poley ŝrambe, ki ŝe sedaj hrani del arhiva in zalog literature. Selitev v novi prostor naĉrtujemo za zadnji kvartal tega leta. Tam bodo zaŝiveli pouk, strokovna knjiŝnica, urejante arhiva in druge dejavnosti. **O.K.**

Iz dejavnosti EDL

El la agado de ESL



ESPERANTSKO DRUŝTVO LJUBLJANA
ESPERANTO-SOCIETO LJUBLJANA

Solena kunsido de ESL je la 100-a datreveno de la fondado de la societo

En Magistrata domo, sidejo de la urba komunumo Ljubljano, okazis la 3-an de decembro 1921 la fondkunveno de unu el la plej malnovaj Esperanto-societoj en Slovenujo, kies fiera heredanto estas Esperanto-Societo Ljubljana. Okaze de tiu estiminda jubileo ni kore invitas Vin ĉeesti solenan kunvenon de la societo

vendredon, la 3-an de decembro 2021 je la 18-a horo en la granda kunsidsalono en Magistrato, Ljubljano, Mestni trg 1.

Provizora programo:

1. Malfermo de la solena kunsido kaj salutvortoj de la gastoj
2. Priskribo de la historio de la societo
3. Hiso de nova standardo de la societo
4. Muzika interludo
5. Prezento de novaj eldonaĵoj de la societo
6. Paperteatra prezentado kamiŝibaj *La nikso*
7. Anekdotoj el agado de la societo
8. Invito al neformala konversacio kaj kunestado.

La kunsido estos son- kaj bild- registrata.

La eniro en la ejoj eblos nur efektivegante la aktualajn preskribojn rilate la korona malsano.

Nastop na PU Kranj

ESL kiel tradicie partoprenis la Paradon de lernado en la urbo Kranj enkadre de la Semajnoj de dumviva lernado (TVU) la 15-an de septembro. Nia stando estis vigle vizitata, krome ni prezentis Esperanton per dialogo kaj kantado sur la podio. En septembro ESL vizitis ankaŭ unu infanĝardenon kaj du elementajn lernejojn kaj prezentis Esperanton per fabeloj kaj ludoj.

Kot ŝe vrsto let doslej smo se tudi letos aktivno vkljuĉili v Tedne vseŝivljenjskega uĉenja (TVU) v organizaciji Ljudske univerze Kranj. Predsednica Nika Roŝej se je po podpisu pogodbe o sodelovanju na prireditvah udeleŝila tudi pripravljalnega sestanka. Prevzela je tudi veĉino zadolŝitev.



Dodatna miza pred stojnico je priŝla zelo prav (Foto O. K.)

Na paradi uĉenja 2021, ki se je odvijala tokrat 15. septembra na igriŝĉih med vrtcema na Planini v Kranju, je imelo naŝe druŝtvo stojnico za predstavitev svoje dejavnosti. Razstavili smo knjiĝe s podroĉij pouka esperanta, literature za odrasle in otroŝke literature. Stojnica je delovala od 9. do 16. ure, obisk odraslih in otrok pa je bil nad priĉakovanji. Na vpraŝanta smo odgovarjali ŝtirje ĉlani EDL. Delili smo zgibanke in vabili na obisk sreĉanj z esperantom v Medgeneracijskem centru Kranj.



Vsaki 15 minut je oder zasedla kaka skupina (Foto A. Ž. S.)

Ob 15. uri je bil na sporedu naš nastop na odru. Gregor Markič je ob lastni spremljavi na kitaro zapel več zabavnih esperantskih pesmi in vmes podal nekaj informacij o tem mednarodnem jeziku. Nika mu je asistiral z mikrofonom in v govornem nastopu.



Po koncu pouka je prišlo mnogo otrok (Foto O. K.)

V programu TVU so še trije dogodki v izvedbi EDL. Najprej je bila v vrtcu Orehek predstavitev pravljice v esperantu z aktivno udeležbo otrok. Na Osnovni šoli Janeza Puharja je bila 20. septembra predstavitev esperanta za šolske otroke. Podobna predstavitev bo še 1. oktobra na Waldorfski šoli v Naklem. Izvajalca teh predstavitev sta Nika Rožej in Gregor Markič. Ta je vnesel v nastope tudi papirne figurice v tehniki origami, ki zelo pritegnejo pozornost otrok. **O.K.**

Jubilejne znamke EDL

La centjara jubileo de ESL estas markita per eldono de »personaj« poŝtmarkoj kun emblemo de la societo kaj la jardatoj de la jubileo. La poŝtmarko A estos uzata interne en Slovenujo kaj poŝtmarko C por la leteroj kaj bildkartoj el Slovenujo al eŭropaj landoj. La poŝtmarkoj kostas po 1,15 € respektive 1,90 €.

Konec septembra so bile izdelane jubilejne znamke ob 100. obletnici EDL. Znamke smo naročili potem, ko Pošta Slovenije ni sprejela v svoj program predloga za

izdajo redne znamke. Odločili smo se za osebni znamki vrednosti A in C za normirane pošiljke v Slovenijo odnosno v tujino. Motiv na znamkah je društveni emblema z dodatkom venca in letnic ustanovitve in jubileja društva. Prva naklada je po 200 znamk vsake od obeh vrednosti.



Jubilejne znamke EDL za Slovenijo in tujino (Foto O. K.)

Znamke že lahko naročite pri tajniku društva ali pisno, najhitrejša pot do njih pa je na torkovih srečanjih v Ljubljani ali Kranju. Ker smo dobili pri naročilu sezonski popust, stanejo znamke A namesto 1,41 € le 1,15 € ter znamke C namesto 2,09 € le 1,90 €. Razveselite svoje esperantske prijatelje in podpornike z lepimi in opaznimi posebnimi znamkami! **O.K.**

Slikanica o Almi Karlin v tisku

En oktobro ĉijare aperos nova bildolibro *Alma – La mondo antaŭ la hejma sojlo*. La libro rakontas pri Alma Karlin, verkistino kaj mondvojaĝistino el la urbo Celje. La tradukon el la slovena prizorgis Nika Rožej. La eldonintoj estas la Centra Biblioteko Celje kaj ES Ljubljana. Prezo: 12 eŭroj, rabato 25% por antaŭmendantoj kaj pograndaj aĉetantoj.

Esperantska različica slikanice *Alma – Svet pred domaĉim pragom* avtorice Mojiceje (Podgoršek) Bonte in ilustratorke Polone Kosec je ŝla v tisk in lahko priĉakujemo izid v oktobru tega leta. Prevod in lektoriranje ŝta opravila Nika Rožej in Janez Jug. Sozaloŝnika Osrednja knjiŝnica Celje in EDL ŝta se dogovorila za naklado 500 izvodov, od katerih prejme naŝe društvo 350 izvodov. Cena slikanice bo 12 EUR, prednaroĉniki in kupci veĉjih koliĉin bodo imeli popust 25%.

Tako bo izpolnjena ŝe ena toĉka letoŝnjega zelo obŝirnega naĉrta dejavnosti EDL. Naŝi ĉlani pa imajo lepo prilooznost razveseliti pred novim letom svoje druŝinske ĉlane in prijatelje doma in v tujini s prijetno slikanico v mednarodnem jeziku. **O.K.**

Iz dejavnosti EDM

El la agado de ESM



Izdaja elektronske knjige

Letos 26. julija spet obeležujemo Dan esperanta, ko je pred 134 leti izšel prvi učbenik. Pravkar tudi poteka pobuda v UNESCO, da se ta dan razglasi za mednarodni dan esperanta.

Pri nas tokrat obeležujemo ta dan z objavo knjižice »O mednarodnem jeziku skozi stoletja«, ki se nahaja na povezavi: http://esperanto-maribor.si/wp-content/uploads/2021/07/O_mednarodnem_jeziku_skozi_stoletja.pdf.

Knjižico objavlja Esperantsko društvo Maribor v elektronski obliki, predvidoma do konca leta pa bo vključena med dokumente Združenja za esperanto Slovenije in objavljena v tiskani obliki.

Zgodba o iskanju skupnega jezika je v knjižici predstavljena s prispevkoma dr. Alenke Divjak in mag. Vinka Ošlaka ter prevodom mnogih zanimivih zapisov, izjav ter mnenj. Na koncu tega dela sta zajeta tudi oba predloga slovenskemu in evropskemu parlamentu.

Knjižica je prispevek k razpravi ob Konferenci o prihodnosti Evrope. Sedanje razmere na področju sporazumevanja pomenijo diskriminacijo, oziroma spodbujajo nacionalizme. Demokratizacija jezikovne politike na področju enakopravnega sporazumevanja s skupnim (drugim) jezikom bo uresničljiva šele, ko bodo ljudje seznanjeni s problemom in dobili možnost izbire. **J. Z. in M. V.**

Spletna stran z elektronskimi publikacijami

Na spletišču EDM lahko pod rubriko *Povezave / Ligiloj* vstopite na stran Publikacije / Publikaĵoj, kjer so na razpolago nekatere publikacije v pdf obliki. Ogled s spletnim brskalnikom ni ustrezen, ker ne prikazuje šumnikov. Dokument si lahko naložite z desnim klikom na sliko in *Shrani povezavo kot...* ali s klikom na sliko in potem, ko se dokument naloži, zgoraj desno poiščite ikono za prenos in si prenesete dokument v svoj računalnik.

Trenutno sta na tej spletni strani na razpolago dve deli: nova publikacija, ki jo je uredil Janez Zadravec, *O mednarodnem jeziku skozi stoletja* in prevod knjige Edmonda Privata *Zamenhofovo življenje*. V prihodnje jih bo še več, če bo zagotovljeno varovanje avtorskih pravic. **O.K.**

111. rojstni dan EDM

13. septembra 2021 je EDM praznoval 111 let od svoje ustanovitve. Dogodek je bil objavljen v informativni oddaji na 1. programu Radia Slovenija, čestitke na spletnih straneh pa so prišle od posameznikov, pa tudi od spletišča Edukado.net. Velja si prebrati zapis o zgodovini društva na spletišču EDM s povezavo: <https://esperanto-maribor.si/zgodovina-drustva/>.

Izlet v Almino Celje

ESM invitis al la urbo Celje por viziti la medion kaj memoraĵojn de la verkistino kaj mondvojaĝistino Alma Karlin. Partoprenis 18 geanoj el pluraj regionoj de Slovenujo. Alma parolis ankaŭ Esperanton dum sia pli ol okjara mondĉirkaŭiro en la periodo 1919 ĝis 1927.

EDM je organiziral 23. septembra izlet v Almino Celje. Na vabilo se je odzvalo 18 esperantistov in podpornikov esperanta iz Maribora, Ptuja, Celja, Ljubljane in Kranja. Marsikdo od nas je izkoristil železniško brezplačno vozovnico za upokoјence.



Zjutraj smo se zbrali pri kipu Alme Karlin (Foto. U. S.)

Ogled sta vodili raziskovalka življenja in dela Alme Karlin Jerneja Jezernik in poklicna celjska turistična vodnica Urša Sreš. Sprehod po mestu je obudil okolje, v katerem je Alma rastla in ustvarjala, obisk v Pokrajinskem muzeju Celje pa je omogočil dodatno razpravo s kustosinjo stalne zbirke o Almi in ogled eksponatov z več kot osemletne poti okoli sveta.



Pred Narodnim domom, korak od Almine rojstne hiše
(Foto O. K.)

Kljub lepemu poznopoletnemu sončnemu dnevju smo bili za nadaljnje ogleda mesta preutrujeni. Fizično lakoto smo si na hitro potešili na celjski tržnici z »Alminim krožnikom«, za duševno hrano pa je še enkrat poskrbela Jerneja, ki je vsakemu podarila po en izvod iz svoje zbirke »Z Almo v svet«, ki šteje že 7 žepnih knjig. Preden smo se razšli, smo se strinjali z ugotovitvijo, da si zasluži Celje vsaj še kakšen dan ali dva za raziskovanje bogate zgodovine mesta in ljudi. **O.K.**

Zamenhofov dan 2021

Letos načrtujemo proslavo Zamenhofovega dne v Mariboru za vso Slovenijo. EDM je rezerviral prostore v mestni četrti Center za soboto, 18. decembra od 11. do 13. ure. Upajmo, da bodo razmere dopustile fizično sestajanje v notranjih prostorih, sicer se bo treba preseliti na splet. Vsekakor si rezervirajte čas in spremljajte objave na spletišču EDM s povezavo <https://esperanto-maribor.si/napovedi-2021/>. **O.K.**

Iz dejavnosti ŽED

El la agado de FES



Železničarsko Esperantsko Društvo
Društvo za uporabo Mednarodnega jezika v prometu
Fervojista Esperanto Societo
Societo por apliko de Internacia lingvo en la trafiko

Aktualno dogajanje v druŝtvu

Dolgoletni predsednik druŝtva Jovan Mirkovič se je preselil v Dom starejših občanov Lendava. Delni prevzem dokumentov na domu sedanjega častnega predsednika druŝtva v Dolgovaških goricah nad Lendavo je bil v juliju tega leta. Prevzeli smo:

- razstavne panele Hiroŝima – Nagasaki in
- preostale učbenike *Mednarodni jezik Esperanto za ŝelezničarje in druge*, prenovljen in izdan leta 2014.

Razstavni paneli so dobro ohranjeni in naša skupna ŝelja je, da jih predamo v trajno hrambo Muzeju novejše zgodovine Ljubljana. **K.K.**

Iz dejavnosti KD SG

El la agado de KS SG

100 let esperanta na Koroŝkem

Davorin Jurač esploras komenciĝon de Esperantomovado en slovena Karintio. La unua E-klubo fondiĝis en la jaro 1921 enkadre de la DPD Svoboda (Laborista Kleriga Societo »Libereco«) en la urbeto Črna na Koroŝkem. Ĝi funkciis ĝis 1940. Oni scias pri du geanoj de la klubo, la aliajn oni provos trovi en la arkivo de la klubo, kiu estis kaŝita dum la dua mondmilito. Post la dua mondmilito oni instruis Esperanton en Gimnazio Ravne.

Po odkritju prepisovalca esperantskega učbenika dr. Ljudevita Koserja *Popolna slovnica esperantskega jezika* Ivana Forstnerja sem poskušal najti sledi Esperantskega kluba, ki je bil ustanovljen 1921 v Črni na Koroŝkem. Ustanovitelj je bil Ivan Forstner, član DPD (delavsko prosvetnega druŝtva) Svoboda iz Črne na Koroŝkem, ki je delovalo od leta 1921 do 1940.

V tem obdobju so se ukvarjali z naslednjimi dejavnostmi in imeli:

- dramsko sekcijo,
- dva tamburaška ansambla starejših,
- mladinski tamburaški ansambel,
- telovadno enoto,
- lastno knjižnico,
- esperantski klub,
- ŝahovski klub,
- godbo na pihala in
- kolesarski odsek.

Kdo so bili ostali člani esperantskega kluba, mi ŝe ni uspelo odkriti, saj so dokumentacijo skrili med drugo svetovno vojno, preden so Nemci vzpostavili oblast v Mežiški dolini.

Kot je Ivan Forstner zapisal:

Mladi sodrugi so pri našem druŝtvu ustanovili tudi esperantski kroŝek, v katerem smo se sami učili tega mednarodnega jezika. Ker ni težak, smo se kar hitro naučili toliko, da smo si ŝe lahko dopisovali in govorili vsakdanje navadne stvari. Teŝava je bila v tem, da smo bili preobloŝeni s funkcijami, ker smo nekateri

sodelovali ŝe pri *drugih* društvi, npr. pri *gasilski* godbi na *pihala*, *ŝahovskem* klubo, *tamburaŝih* itd.

Po podatkoh g. Aleŝa Moliĉnika, je v Ĉrni uĉila esperanto ga. Johana Travnekar, rojena Navršnik. Privatno je uĉila esperanta dr. Ramŝaka, primarija ĉrnjanske bolniŝnice, ki je prvi leta 1926 opravil transfuzio krvi v Sloveniji. Prav tako je uĉila mlade v petdesetih letih preŝjnega stololetja. Pozneje se je preselila na Ŝtajersko v Lenart ali Maribor, kjer je tudi umrla.

Iz *Koroŝkega fuŝinarja*, avgust 1954, je ĉlanek »*Esperanto na Ravnah*«:

Lansko leto je priŝel na Ravne tov. Janko Boŝiĉ. Okoli 30 teĉajnikov-gimnazijcev je pridno zaĉelo ŝtudirati esperanto ter dopisovati v tuje drŝave, o njihovem delu priĉa lanskoletna razstava esperantske literature in njihove korespondence. Razstavo so priredili v poĉastitev 38. esperantskega kongresa v Zagrebu od 25. julija do 1. avgusta 1953 pri »Podjuni«. Vse to priĉa, da esperanto ni mrtev jeziko, da obstaja praktiĉna uporaba tega jezika. Zahvalo za doseŝeni uspeh so esperantisti dolŝni predvsem tov. dr. Suŝniku in tov. Kokalu, naŝemu ŝupanu.

Moje delo se tu ne konĉa. Ŝe vedno iŝĉem gradiva. Je pa teŝko, ker je mnogo ljudi, ki so o tem kaj vedeli, ŝe umrlo. **Davorin Juraĉ**

Iz zgodovine gibanja

El la movada historio

Ĉi tiu rakonto estis programero de la renkontiĝo okaze de Esperanto-Tago 2021 sur la monto Lisca. La aŭtoro revivigis la kun Esperanto ligitan historion de la montkabano Tonĉkov dom sur Lisca kaj siajn proprajn kontaktojn kun la familio Haas en Maribor.

Romanco sur Lisca

Iun vesperon de la dudeka jarcento haltis ekspresa trajno en Sevnica. El ĝi eliris ŝi kaj tuj ekpaŝis la vojon al monto Lisca. Ŝi ne timis nekonatan terenon, ŝi kuraĝe deziris plenumi la taskon, fari personan kontakton kun li jam atendanta ŝin en la montkabano ĉe la pinto de la monto.

Li iom pli frue venis el ne tro malproksima ejo Trebĉe, situanta ĉe Podsreda en la orienta parto de montaro Bohor. Tie li kaŝe loĝis ĉe lia onklino Ana, ĉar li estis tre serĉata persono de tiamaj aŭtoritatoj. Li estis grava funkciulo de tiam malpermesita komunista organizo en

reĝolando Jugoslavujo. Kaŝitaj vojoj kaj kunsidoj estis por ilegala aktiveco tre gravaj. La monto Lisca estis unu el tiaj lokoj. Li neniam vojaĝis sur stratoj, kie li povus trafi policistojn. Liaj vojoj estis vojetoj, plejparte tra la arbaroj.

La oficiala parto de la laboro inter li kaj ŝi en tiu anekdoto ne estas prezentita, tio estas la historio. Por ni estas grava la humana parto de tiu kunveno.

Kiuj do ili estis?

Ŝi estis Herta, la filino de Priska Haas, germana instruistino, kaj Henriko Haas, tre konata advokato en Maribor, ambaŭ aŝtroj. Henriko Haas estis fondinto de la unua esperanto-societo en Slovenujo. La tuta familio Haas bone parolis ankaŭ la slovenan lingvon.



Herta Haas



Priska Haas

La kunveno sur Lisca kun li – Josip Broz, nomata Tito – kaŭzis, ke inter ili ekflamis forta, profunda amo. Ili geedziĝis kaj baldaŭ ricevis filon. La familia vivo inter ili estis tre malfacila. Preskaŭ dum la tuta tempo ili vivis kiel persekutitaj personoj, aparte dum la dua mondmilito, kiu kaŭzis ilian disiron.

SinJORINO Herta neniam plendis aŭ akuzis Josipon pri tio. Ŝi ĉiam diris, ke por la disiro kulpas la milito kaj ke ili estas viktimoj de ĝi.

Sed tamen mi devas al tiu ĉi anekdoto ion aldoni. Temas pri miaj personaj kontaktoj kun Herta kaj ŝia patrino Priska.

Mi esperantiĝis en la jaro 1954. Por fari ekzamenon B, en Maribor min instruis sinJORINO Priska, tre intenzive, dufoje en semajno aŭ plu. Kelkfoje mi renkontis ankaŭ sinJORINON Herta, ŝi ofte venis el Belgrado viziti la patrinon. Ni bone interkonatiĝis. Ŝi demandis min, de kiu loko mi estas, ĉar mia dialekto ne estas mariborana. Kiam mi menciis mian hejmon sur la deklivo de Lisca, ŝi tuj rakontis al mi pri tiu al ŝi tre kara

loko, montris al mi plurajn fotojn kun Tito kaj klarigis la kaŭzon de ilia disiro.

Ŝia patrino Priska estis okulmalsana. De tempo al tempo ŝi estis akceptita en la armea kliniko en Belgrado. Herta konfidis al mi la akompanon kaj transdonadon al stevardo de dormvagono de la nokta trajno al Belgrado kaj la akompanon en la loĝejon de sia patrino, kiam ŝi revenis. Tio okazis kelkfoje. Por sekurigi tiun transdonadon estia bezonataj du personoj – Janez Zadavec estis la dua, ĉar kelkfoje pro okupeco en la fabriko mi ne povis plenumi tiun taskon.

Tempo tre rapide pasas. Mi kaj Janez Zadavec fariĝis maljunuloj. Tiu priskribo estas unu el miaj plej belaj memoroj el mia vivo en Maribor – mi estas certa, ke Janez plene konsentas kun mi.

Ho – ve! Mi preskaŭ forgesis mencii, ke Josip Broz Tito ankaŭ parolis Esperanton – la romano sur Lisca estis la komenco de lia esperantiĝo.

Vinko Zalezina, Orešje nad Sevnico, en julio 2021.

Leposlovni kotiček

Beletra angulo

Vinko Ošlak: **Recenzo**

Clemens J. Setz: *Die Bienen und das Unsichtbare* (La abeloj kaj la mondo nevidebla); Surkamp, Berlin 2020, 416 p., forte bindita; prezo: 24,00 + postkostoj. ISBN: 978-3-518-42965-5

En Julio 2021 la aŭstra verkisto el Graz Clemens J. Setz por tiu ĉi romano ricevis la plej renomman germanan literaturan premion Georg-Büchner-Preis – kaj la legantoj de la germana – kaj verŝajne baldaŭ ankaŭ de aliaj lingvoj – post longaj jaroj de prisilentado de la intertempe jam pli ol 130 jarojn troviĝanta propra literaturhistorio en la internacia lingvo Esperanto tiel ricevis literaturan konfirmon de sia ignorita, ofte primokita laboro kaj klopodo, antaŭ jardekoj ankaŭ fare de ambaŭ totalismaj reĝimoj persekutita lingvo kaj lingva komunumo.

Clemens J. Setz, naskita 1982 en Graz en Aŭstrio, studis matematikon kaj germanan lingvon kaj literaturon. Li estas tradukisto, poeto kaj prozisto. Ĝis nun li akiris aron da agnoskoj kaj premioj por sia literatura verkaro, tiel:

- 2008: premio de la aŭstra Federacia Ministerio pri instruo, arto kaj kulturo por "speciale sukcesa literatura debuto"
- 2008: Ernst-Willner-Premio ĉe la Ingeborg-Bachmann-konkurso
- 2010: literatura premio de Bremen
- 2011: premio de la Lepsika libro-foiro (kategorio: fikcio)
- 2010: Outstanding Artist Award pri literaturo
- 2013: literatura premio de la kultura rondo de la germana ekonomio
- 2015: Wilhelm-Raabe-Literaturo-Premio
- 2017: literatura premio de Stirio (federacia lando de Aŭstrio)
- 2018: Thomas-Pluch-scenaro-premio – speciala premio de la Ĵurio por *Zauberer* (Magiisto)
- 2021: Premio Georg Büchner, la plej altan literaturan distingon por germanlingvaj aŭtoroj.

Antaŭ kelkaj jaroj li hazarde renkontis poemojn de la skota esperantlingva poeto kaj kandidato por la Nobelpremio por literaturo, jam mortinta William Auld. Kun granda miro li rimarkis, ke li povis la poemojn kompreni, sen ke li antaŭe la lingvon estus lerninta. Tiel li ekvojaĝis sur la vojon de tiaj lingvoj, kiaj en la historio de la ideo pri internacia lingvo estis multaj, tamen nur unu el ili, Esperanto de Zamehof, sukcesis fariĝi matura kaj ankaŭ literature elpruvita lingvo (jam dum 20 jaroj ekzistas ankaŭ propra esperanta centro P. E. N., tre agema en la tutmonda centro de la kluboj P. E. N.).

Li komencis sian laboron ne supraĵe; la lingvon, kiu jam antaŭ Esperanto montris bonajn ŝancojn sian celon atingi, Volapukon, fare de la bavaria paroĥestro d-ro Marteno Schleyer el Baden, li eĉ relative bone lernis, kvankam tiu lingvo post la jaro 1887, kiam aperis Esperanto de Zamenhof, antaŭ ĝi sian ŝancon perdis kaj la plimulto da kluboj volapukistaj simple transiris al Esperanto kaj ĝia komunumo. Sed tre bone la juna verkisto el Graz lernis Esperanton, en kiu li tralegis aron da libroj kaj kelkajn tekstopartojn ankaŭ tradukis en la lingvon germanan. Inter la verkantoj en Esperanto li plej alte rangigas la jam menciitan esperantan poeton William Auld kaj la aŭtorinon de prozaj libroj el Kroatujo, mag. Spomenka Štimec, kiu cetere estas ofta literatura gasto en Slovenujo. Ŝia romano *Ombro sur interna pejzaĝo*, tradukita en la slovenan, atendas eldoniston. La afero estas aparte interesa, ĉar la verkisto Clemens J. Setz ne sentas sin adepto de la movado por la internacia lingvo, do esperantisto, sed li estas fascinita de la lingvo mem kaj de la verkoj, en ĝi skribitaj, kaj tio estas tre sana bazo

por estiĝo de lia romano, kiun li do ne verkis kiel unuflanka, partieca entuziasmo, sed – nun neŭtrala al Esperanto mem – kiel literatura observanto kaj vojaĝanto tra la ebenaĵoj kaj kanjonoj en la historio de tiu lingvo kaj de ĝia parolkomunumo.

La sekvantan rakonton prezentis Vinko Zalezina dum la vizito de la preĝejo Jurkloŝter (vidu la artikolon pri la renkontiĝo sur Lisca okaze de la Esperanto-Tago 2021, p. 2).

La ido de granda amo

Antaŭ ses jarcentoj regadis grandan parton de Slovenujo kaj Kroatujo famaj potenculoj, la grafoj de Celje. Frederiko, la filo de Hermano de Celje, renkontis en la vilaĝeto Diŝnik en Kroatujo, sian grandan amatinon Veronikan. Lia patro Hermano akre kontraŭis tiun amon. Ili geedziĝis, sed estis persekutitaj, finfine Veronika estis mortigita – dronigita en kuvo en la kastelo Ojstrica (Osterwitz).




Frederiko kaj Veronika, titolbildo de la rakonto de Karel Geržan, ilustris Severina Trošt Šprogar, eldonis Celjska Mohorjeva družba, 2012

Antaŭ tio Frederiko kaj Veronika sekrete loĝis en la kartuzia monaĥejo en Jurkloŝter. Tie naskiĝis la frukto de tiu granda amo – la filo Anzek. Frederiko kaŝis lin en solece staranta muelejo sub belega akvofalo de la rivereto Gračnica ĉe la vilaĝeto Marof, proksime de Jurkloŝter.

Post la morto de Veronika, la patro Frederiko decidis viziti sian filon. Veninte al la muelejo, li demandis la

gemuelistojn pri la filo. Ili diris, ke li plejparte travivas tute sola, kviete kun stranga parolado ĉe profundaĵo sub la akvofalo. Ili diris, ke li ne estas ordinara infano, sed tamen estas tre bela.



La akvofalo de Gračnica ĉe Marof (Foto M. K.)

Frederiko iris al la profundaĵo. Trovinte Anzekon li diris, ke li estas lia patro. Nenian impreson ĉe li li ne rimarkis post tiu sinprezento. Demandante Anzekon, kial do li estas kutime en la soleco, sen parolado kun aliaj, Anzek respondis, ke li nepre ne estas sola, ĉar li ĉiam parolas kun sia patrino en la profundaĵo, kie ŝi vivas kiel akva fejno.

Konsternita la grafo demandis la gemuelistojn, kiuj – pro dio – enigis tiajn stultaĵojn en la kapon de la infano. Li ricevis la respondon, ke la infano estas tute diversa de aliaj infanoj, trovanta pacon kaj feliĉon ĉe la profundaĵo.

Grafo Frederiko post tiu vizito sendis sian filon en la kartuzian monaĥejon Žiče (pron. Ĵiče), kie li kiel frato-laiko mortis tre juna.

Estas vaste konata onidiro, ke idoj de fatala aŭ granda amo estas plejparte tre belaj homoj, la plejmulto da ili estas tre stranga, sed ne malica. La dua varianto de tiu onidiro estas, ke ili estas malbelaj, tre inteligentaj, sed bedaŭrinde tre malicaj. Anzek apartenis al la beluloj.

Vinko Zalezina, Orešje nad Sevnico, en julio 2021.

Obvestila in vabila

Informoj kaj invitoj

Wikipedio havas pli ol 300 mil artikolojn

La Esperanta Vikipedio atingis novan rekordon: 300 000 artikoloj. Ĝi nun estas la 35-a Vikipedio laŭ la

amplekso. Malpli grandaj estas ekzemple la bulgara, dana kaj kroata Vikipedioj.

La nova rekordo estis atingita per instigo de la kampanjo [Vikipedio 300 000](#), subtenita interalie de UEA, [ELiSo](#), [ILEI](#), [E@I](#) kaj la [Fonduso Instigo](#). Jam aperis kelkdek pliaj, el iuj multaj sendube enhavas gravajn informojn kaj estas bonkvalitaj.

La antaŭan grandan mejloŝtonon la Esperanta Vikipedio atingis en 2014, kiam estis publikigita la 200 000-a artikolo.

En intervjuo pri la kampanjo Vikipedio 300 000 en majo Michal Matúšov, en Esperantujo pli konata sub la nomo KuboF Hromoslav, klarigis, kial gravas atingadi novajn rekordojn:

»Parte simple pro tio, ke Vikipedio tiel kovros pli multajn aferojn kaj donos al la esperantistoj utilajn informojn pri pli multaj temoj. Kaj tio per si mem pliriĉigas la Esperantan komunumon. Sed, ja, estas ankaŭ alia kialo – pli emocia. Atingo de ronda sojlo per novaj altkvalitaj artikoloj montras kaj al Vikipedianoj mem, kaj al la Esperanta komunumo, ke ni tion kapablas fari kaj sukcesas. Kiam oni venas al tia sojlo, oni nature plirapidigas kreadon de novaj artikoloj; sed dum kutima tempo oni pli atentigas pri jamaj artikoloj kaj plibonigas ilin.«

Laŭ la aktuala statistiko la artikoloj en la Esperanta Vikipedio ekde la lanĉo en 2001 estis redaktitaj pli ol 7,2 milionojn da fojoj. Ĉiu paĝo estis averaĝe redaktita pli ol dekfoje, do eblas esperi, ke iom post iom la kvalito de la enhavo pliboniĝas. Kaj se vi trovos eraron, vi povos ĝin mem korekti, atentigas Michal Matúšov:

– Rilate al plibonigado de la jama enhavo mi povas diri: tio ja okazas, kvankam eble ne tiom rapide, kiom iuj volas. En Vikipedio ni havas diraĵon "Ĉu vi demandas, kial plu estas tiu aŭ tiu eraro en Vikipedio? Ĉar vi ĝin ne korektis!" Kiel mi skribis, Vikipedio estas malfermita, kaj se vi opinias, ke al iu artikolo io mankas, vi ŝajne estas la plej taŭga persono por tion aldoni! **Fonto: Libera Folio**

Knjiĝno darilo

V avgusto je knjiĝnica ZES prejela iz rok Vinka Ošlaka, ĉastnega člana ZES, po veĉ izvodov treh njegovih del v esperantu iz zadjnega obdobja.

Prvo delo je njegov esej o krŝĉanski veri *La Fido*, ki je izŝla leta 2019 pri zaloĝbi Kava-Pech na Ĉeŝkem. Druga knjiĝa je Oŝlakov esej o sadovih filozofije in zbrane misli *Araneĝo en la kapo*, ki je izŝla leta 2020 pri KUD Apokalipsa v Ljubljani. O tretjem delu, romanu Yassirja Erica *Lerninta malamon, spertinta amon*, pa smo ŝe obŝirneje pisali pred enim letom v naŝem biltenu ŝt. 2020/3 (september) na strani 14.

Bralcem, ki jih posebej zانيا krŝĉanska misel, priporoĉamo, da si te knjiĝe izposodijo v naŝi strokovni knjiĝnici, lahko pa jih tudi pri nas nabavijo, ĉe ŝelijo imeti svoj izvod. **O.K.**

Predlogi za prihodnost Evrope

Ĉi tie ni prezentas kvin proponojn por la Konferenco pri la estonteco de Eŭropo, kiujn ni rekomendas subteni al la esperantistaro kaj apogantoj. Ĉiuj tekstoj estas maŝine tradukitaj el la originaj lingvoj en la slovenan. Sekve tio estas nefidindaj tradukoj. Ni aldonis aktualan staton de ŝatsignoj kaj komentoj.

Spodaj predstavljamo od EEU in UEA priporoĉene predloge v okviru Konference o prihodnosti Evrope. Izvirni predlogi so bili podani v razliĉnih jezikiĝ EU, prevod v slovenŝĉino ni uraden, ker je bil opravljn avtomatsko in/ali s popravki bralcev.

Priporoĉamo vam, da si predloge ogledate na strani <https://futureu.europa.eu/processes?locale=sl>, pri ĉemer lahko izbirate vse jezike EU. Ker je zamisli veliko, jih razvrstite po mnoĝini vŝeĉkov pri temah Izobraŝevanje itd. ter Druge zamisli. Predlogi v zvezi z esperantom so na vodilnih mestih! Da lahko glasujete in komentirate, se morate prviĉ obvezno prijaviti. Nekateri predlogi so prevedeni tudi v esperanto – te prevode najdete v komentarjih k predlogu. Dodajte ŝe svoj komentar, ne le vŝeĉek, in utemeljite svojo podporo predlogu.

EU potrebuje bolŝe uĉenje jezikov **Sean O RIAIN**

04/06/2021 18:08

ŝifra: cofe-PROP-2021-06-23893

Vŝeĉki: 380 82 komentarjev

Evropejci se med seboj ne sporazumevajo zlahka, saĝ nimajo znanja tujih jezikov. Le malo jih lahko sledi radijskim ali televizijskim programom, ŝe manĝ pa sodeluje v razpravah v drugem jeziku. To je velika ovira za obĉutek skupnosti med Evropejci. EU mora korenito izbolŝŝati uĉenje jezikov. Drŝavlĝani pozivajo EU, naj razŝirja rezultate inovativnega programa Erasmus+, ki se je v letih 2018 in 2019 izkazal za uspeŝnega v ŝtevilnih osnovnih ŝolah v treh drŝzavah EU (Bolgarija, Hrvaŝka, Slovenija). Program „Veĉjeziĉni pospeŝevalec“ (<https://epale.ec.europa.eu/en/content/multilingual-accelerator-now-you-have-opportunity-accelerate-language-learning-your-students>) je pokazal znatno in hitro izbolŝŝanje znanja tujih jezikov pri uĉenciĝ, stariĝ od 8 do 9, ki so te spretnosti pridobili s prvim uĉenĝem omejenega in skrbno izbranega jezika, tj. Esperanta. Njihov obĉutek uspeha je tem otrokom omogoiĝ

uspešnejše in hitreje učenje drugih jezikov. Učitelji, ki prej niso obvladali jezika, so potrebovali le enotedenski tečaj, da bi lahko poučevali program. Državljeni pozivajo EU, naj ministrstva za izobraževanje vseh 27 držav EU spodbudi k poučevanju tega šolskega programa pod poklicnim pedagoškim nadzorom in v večjem obsegu, da bi preizkusili učinkovitost tega inovativnega pristopa, ki bi lahko korenito spremenil učenje jezikov po vsej EU-27.

Uradno priznanje Esperanta kot enega od jezikov državljanov EU **Louis v. Wunsch-Rolshoven**

26/05/2021 14:07

Šifra: cofe-PROP-2021-05-17955

Všečki: 281 133 komentarjev

Osnove Esperanta so bile objavljene v Varšavi leta 1887. Od takrat se je na milijone ljudi v Evropi in po svetu, v več kot 120 državah, naučilo Esperanto. Poleg tega je v Esperantu več tisoč domačih govorcev. Nastala je bogata kultura s posebno in mednarodno literaturo in pesmi. Poljska je Esperanto priznala kot kulturno dediščino, Hrvaška je Esperanto pohvalila kot kulturno dobro, Avstrija v nacionalni knjižnici vzdržuje zbirko Esperanto, Madžarska že desetletja podpira Esperanto - tam je na primer Esperanto na številnih univerzah sprejemljiv za jezikovno certificiranje. Pozivamo, naj Evropska unija uradno prizna Esperanto kot jezik evropskih državljanov. Esperanto je skupni jezik državljanov vseh držav EU. Esperanto se sreča zaradi stika in razumevanja. Organe Evropske unije pozivamo, naj podprejo to neposredno komunikacijo z državljani. Svobodna izbira jezika, v katerem se želimo pogovarjati drug z drugim - ga prepoznajte in promovirajte!

Poučevanje jezikov v Evropi **Thomas Hufkens**

19/04/2021 17:43

Šifra: cofe-PROP-2021-04-260

Všečki: 130 57 komentarjev

Predlagam, da vsaka šola v Evropi poučuje Esperanto kot drugi jezik. Tako lahko ta jezik postane uradni jezik Evrope. Angleščina se zdaj pogosto uporablja, medtem ko nobena država EU tega jezika nima kot maternega jezika.

Eperanto - mednarodni pomožni jezik **Paolo Pellegrino**

27/04/2021 23:46

Šifra: cofe-PROP-2021-04-1536

Všečki: 72 53 komentarjev

Olajšujemo učenje več jezikov s poučevanjem Esperanta v osnovnih šolah. Univerzitetni študij je pokazal, da pozneje izboljšuje učenje drugih jezikov. Ta jezik se je izkazal za odličen povezovalni jezik. Uporablja se lahko za prevajanje med dvema različnima jezikoma, ne da bi se spremenil občutek prevoda. S tem se prihranijo viri, saj se zmanjša število osebja, potrebnega za tolmačenje na zasedanjih Evropskega parlamenta, tako da se ta storitev lahko razširi na druge evropske kontekste, v katerih so zdaj diskriminirani vsi uradni jeziki razen 3; eden od teh izbranih jezikov ni več uradni jezik. Za odpravo sporov v zvezi z verodostojnim tolmačenjem uporabljamo pomožni mednarodni jezik kot pravni referenčni jezik. Tri zamisli so podlaga za rešitev težav, povezanih z razumevanjem med evropskimi državljani.

Esperanto, skupen in nevtralen jezik, načrtovan za lahko učenje. Novo orodje za bolj združeno Evropsko unijo. **Enrique Hinojosa de Guzmán Alonso**

10/05/2021 09:05

Šifra: cofe-PROP-2021-05-5399

Všečki: 244 216 komentarjev

Predlagam postopno promoviranje učenja esperanta kot skupnega in nevtralnega jezika, načrtovanega za lahko učenje. Novo orodje za bolj združeno Evropsko unijo.

Objave v slovenskih medijih

Radio ARS (3. program RTVSLO), 27. julija 2021, je v počastitev Dneva esperanta v okviru oddaje *Jezikovni pogovori* ponovil odličen pogovor z Vinkom Ošlakom, ki je bil posnet in prvič predvajan pred tremi leti, to je 31. julija 2018 ([Esperantist Vinko Ošlak - ARS \(rtvslo.si\)](https://www.rtv.slo.si)). Ponovitev oddaje, ki traja 20:22 minut in je naslovljena *Neverjetne poti esperanta*, lahko poslušate s povezavo <https://ars.rtv.slo.si/2021/07/jezikovni-pogovori-286/>. Spraševalec je novinar uredništva za kulturo Aleksander Čobec, ki zna vprašati prave stvari. **O.K.**

Delo, 26. avgusta 2021, je objavilo na strani 7 v rubriki *Pisma bralcev in odmevi* članek Janeza Zadravca z naslovom *Skupni jezik za evropsko zavest in identiteto?*. Avtor opozarja na razprave državnikov na Blejskem strateškem forumu in na pričakovanja državljanov v okviru Konference o prihodnosti Evrope glede skupnega jezika kot gradnika evropske zavesti in identitete. Članek se konča s pozivom k vključevanju v

razprave in sodelovanju državljanov pri dejavnostih, ne pa pasivnem poslušanju vodilnih politikov. **O.K.**

Radio Prvi (1. program RTV SLO), 13. septembra 2021, je v jutranji informativni oddaji *Na današnji dan* poročal o 111. obletnici ustanovitve EDM. Omenjen je bil zanimiv podatek, da je bilo društvo podružnica Štajerskega esperantskega društva v Gradcu. Naveden je bil tudi izid Koserjeve slovnice in predvajan izseček izjave Vinka Ošlaka. Posnetek si lahko predvajate s <https://www.rtv slo.si/4d/arhiv/174804955?s=radio>. Trajanje posnetka je 5:31 minut, o EDM je govora med 3:06 in 4:28. **O.K.**

Spletišče Filozofske fakultete Univerze Ljubljani <https://www.ff.uni-lj.si/izobrazevanja/center-za-pedagosko-izobrazevanje/jezikovni-tecaji> objavlja razpis v študijskem letu 2021/22 za tečaje iz skupno 31 klasičnih in sodobnih jezikov, med njimi tudi iz esperanta. Izvajajo jih ustrezno usposobljeni in izkušeni predavatelji in predavateljice. Tečaji obsegajo 60 ur in stanejo 239 EUR za študente in dijake ter 359 EUR za ostale. Za esperanto je predvidena začetna stopnja, predavateljica dr. Simona Klemenčič ter termin ob ponedeljkih od 19:40 do 21:15, začetek 8. novembra. V kolikor bodo razmere dopuščale bo ena tretjina predavanj s fizično prisotnostjo, ostalo pa preko videokonferenc. **O.K.**

Jarkotizoj de SIEL kaj ESL

Letna članarina **ZES** za individualne člane je 12 € za zaposlene, 6 € za študente, upokoјence in brezposelne ter 0 € za mlade do 18. leta. Članarino ali prostovoljne prispevke lahko plačate na srečanjih in sestankih ali na poslovni račun ZES pri Delavski hranilnici d. d. Ljubljana št. SI56-6100-0001-2538-761 z obrazcem UPN. Kot kodo namena vpišete »char« in namen plačila: »priimek, članarina in ustrezno leto oz. obdobje«. Pri referenci prejemnika vpišete kodo SI99, ostalo pa pustite prazno.

Letna članarina **ED Ljubljana** ostaja na ravni iz prejšnjega leta, to je 12 € za zaposlene, 6 € pa za brezpo-

selne, upokoјence in študente. Članarino ali prostovoljne prispevke lahko plačate na srečanjih in sestankih ali na poslovni račun EDL pri Delavski hranilnici d. d. Ljubljana št. SI56-6100-0000-1703-764. Glejte še navodilo za izpolnitev obrazca v zgornjem odstavku. **O.K.**

Kion oni legos en la sekvonta numero?


Por la sekvonta numero de *Informacije / Informoj*, kiu aperos meze de novembro 2021, ni antaŭvidas la raportojn pri la aŭtunaj aranĝoj en Esperantujo kaj kelkajn gravajn anoncojn. Krome ni atendas artikoletojn pri:

- la invito al la 100-jara jubileofesto de ESL
- la invito al la Zamenhof-Tago 2021 en Maribor
- estontaj esperantaj kursoj en Slovenujo
- novaj poŝtmarkoj de ESL
- la eldono de la bildlibro *Alma*
- la malfermo de la faka biblioteko
- el la historio de nia movado ktp.

La redaktoro rekomendas sin por kontribuoj pri viaj agado, proponoj, komentarioj, fotoj kaj rimarkoj, kiuj povus interesi la legantaron. Aparte estas bonvenaj verkoj en Esperanto, ĉar ni ĉiuj bezonas ekzerciĝon kiel aŭtoroj kaj legantoj. **O.K.**

Pa ŝe to....

Kaj ankaŭ tion ĉi...



La evoluo de la homaro

INFORMACIJE / INFORMOJ izdaja / eldonas Zdrufenje za esperanto Slovenije / Slovenia Esperanto-Ligo, Štefanova 9, SI-1000 Ljubljana, Slovenija / Slovenujo. <http://www.esperanto.si>. Matična št. / kodnumero 1205226. ID za DDV / n-ro por AVI: 93737777. Poslovni račun / bankkonto: IBAN SI56 6100 0001 2538 761 pri / ĉe Delavska hranilnica d. d.. (Swift-kodo: HDELSI22). Uredil / redaktis Ostoј Kristan, lektoriral / kontrollegis Tomaž Longyka.

ISSN 2385-992X Naklada / eldonkvanto: 60

ISSN 2385-9628 URL: <http://www.esperanto.si/eo/bulteno-informacije-informoj-0>